

La tria Somera Migrado en Alpoj okazonta en Grizono
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 709, 1977.05.11 & 13 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan jaron ni detalege raportis pri nia partopreno en la dua Somera Migrado en Alpoj. Pluraj geaŭdantoj skribe esprimis la deziron esti informitaj pri la venonta migrado. Jen hodiaŭ ni perradie povas respondi al ili.

A.- Tiu ĉi tria Somera Migrado en Alpoj estos okazo por konatiĝi kun sovaĝromantika Grizono. Estas la lando de la tri Grizaj Ligoj, kie ekde pratempe kunvivadas tri kulturoj kaj tri lingvoj : la romanĉa, la itala kaj la germana.

Cl.- La migrado disvolviĝos unue en la proksimeco de Davos kaj poste en Alta Engadino. Jen la programo. Alventago : la 30-an de julio. Agrabla migrado kun dorsosakoj ekde Klosters, tranoktado en montokabano, migrado kaj veturado al Bever, proksime de Sankt Moritz. 4-taga restado en Bever kaj ekskursoj sen dorsosakoj en la ĉarma ĉirkaŭa regiono (Piz Muragl, 3150 metrojn de alteco), apud la lagoj Silvaplana, Segl, ktp. La ekskursado konkludiĝos je la 4-a de aŭgusto.

A.- La partoprena kotizo estas por lernantoj kaj studentoj : 180.- svisaj frankoj, por plenkreskuloj : 210.- svisaj frankoj. Ĝi inkludas ĉiujn veturadojn de la renkontiĝo ĝis la adiaŭo, ĉiujn komunajn manĝojn kaj piknikojn ekde la unua vespero.

Cl.- Por ricevi informilon aŭ aliĝi oni skribu al Somera Migrado, Svisa Esperanto-Junularo, Rue de la Cure 5, CH-2035 Corcelles, Svislando. Ni ripetas : Somera Migrado, Svisa Esperanto-Junularo, Rue de la Cure 5, CH-2035 Corcelles, Svislando. Oni ankaŭ povas peti la informilon tra la kanalo de ni radio-elsendejo.

A.- Pri alia esperanto-aranĝo disvolviĝonta en Svislando ankaŭ hodiaŭ ni deziras raporti. Temas pri la 17-a Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando, kiu disvolviĝos de la 12-a ĝis la 18-a de septembro en Magliaso, ĉe la lago de Lugano en la kantono Tiĉino, kie oni parolas la italan lingvon.

Cl.- El la ĝenerala informilo ni citas kelkajn erojn. « *La feriocentro kuŝas apud la lagobordo meze en bela parko kaj konsistas el diversaj modernaj konstruaĵoj kaj propra banejo hejtebla.*

A.- *Antaŭtagmeze okazas esperanto-lecionoj diversgradaj. La partopreno estas libervola. Posttagmeze estas programitaj ekskursoj, lundon per aŭtobuso al Porto Ĉeresio, mardon per telfero al la belvidejo Monte Lema (1620 metroj de alteco), merkredon al Locarno apud la lago Maggiore, ĵaŭdon ŝipe sur la lago de Lugano. Vendredo estos la ripoztago. Ekde la 11-a horo Kultura Centro Esperantista prezentos libroekspozicion, kie ĉiu povos riĉigi la propran esperanto-libraron. Sabaton busa ekskurso permesos lastan viziton de la kantono Tiĉino. »*

Cl.- Nun pri la prezoj, kiuj inkludas la pensionon kaj tranoktadon kaj la ekskursojn : « *Tranoktado en dulita ĉambro : 350.- svisaj frankoj. Aldoniĝas krompagoj por tiuj, kiuj ŝatus tranokti en unulita ĉambro. Por gejunuloj aŭ familioj estos je dispono tri- aŭ kvar-litaj ĉambroj kun reduktado de 40.- svisaj frankoj.* »

A.- Por ricevi la detalan informilon aŭ aliĝi, oni skribu al sinjoro Ernst Glättli, Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg, Svislando. Ni ripetas : sinjoro Ernst Glättli, Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg, Svislando. Estas eble peti tiun ĉi informilon tra la kanalo de nia radio-elsendejo.

Cl.- La postan monaton, tio estas je la 23-a kaj 24-a de oktobro, disvolviĝos en Bazelo Kultura Semajnfino Esperantista. Interesatoj pri tiu ĉi aranĝo altnivela povas peti informilon skribante al Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, CVH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

A.- Je la sama adreso estas petebla la informilo por la 21-a Esperantista Skiferio, kiu disvolviĝos en Adelboden de la 26-a de decembro ĝis la 5-a de januaro 1978. Ni ripetas la adreson : Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, Ch-2301 La Chaux-de-Fonds. Ankaŭ tra la kanalo de nia radio-elsendejo oni povas akiri tiujn ĉi informilojn pri la kultura semajnfino en Bazelo aŭ pri la 21-a skiferio esperantista en Adelboden.

Cl.- Kiel vi konstatis per tiuj kelkaj informoj, ne estas la eblecoj, kiuj mankas, por malkovri Svislandon pere de esperanto. Povu niaj geaŭdantoj multnombre profiti pri tiuj ĉi aranĝoj. Marŝado en Alpoj grizonaj, ŝipado sur la lagoj tiĉinaj, kulturiĝo en bazela lernejo, skiado en la adelbodena skiparadizo, jen eventoj, kiuj lasos al vi lumplenajn rememorojn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !